

# **La Riverego**

Somero de 1995

Esperanto-Societo Kebekia

N<sup>o</sup> 39<sup>o</sup>, Jaro 10<sup>o</sup>

## **Ma première fin de semaine espérantiste**

Jérôme Frédéric Bouchard

**J**e suis membre de la Société québécoise d'espéranto depuis la mi-août 1994. J'avais commencé à étudier l'espéranto en autodidacte chez moi au mois de mars 1994. N'ayant jamais rencontré d'espérantiste auparavant (j'étudiais l'espéranto en me disant que je devais faire ma part et que si tout le monde faisait de même, l'idéal espérantiste serait atteint...), je décidai au mois de mars 1995 de participer à la rencontre hivernale de la S.Q.E.

J'habite près de Rivière-du-Loup et j'ai dû faire cinq heures de route pour me rendre à Montréal. Plusieurs raisons me motivaient : je voulais voir si j'étais capable de parler ou, au moins, de comprendre l'espéranto, mais surtout je voulais rencontrer les membres de la S.Q.E. et je voulais savoir comment la Société était organisée, vers quoi elle aspirait...

La rencontre s'est très bien déroulée, l'horaire était chargé mais les activités, intéressantes, et j'ai pu découvrir le très chaleureux accueil *espérantiste*, faire de nouvelles connaissances, visiter Montréal mais surtout, j'ai pu parler et entendre parler espéranto. J'ai été assez surpris de voir que j'étais capable de discuter avec le peu de vocabulaire espéranto que j'avais.

Cette rencontre m'a fait devenir un espérantiste plus convaincu. J'irai sûrement à la rencontre estivale au mois de juin, si mon travail me le permet. J'espère y rencontrer d'autres

débutants qui, comme moi, au mois de mars, auront décidé de faire une immersion en espéranto et de devenir actifs dans la communauté espérantophone.

## **Vintra renkontiĝo en Montrealo**

Arnold Langberg

Bill Harris kaj mi (el la Esperanta Societo de Nova Anglujo) vojaĝis al Montrealo por ĉeesti la Vintran Renkontiĝon de la Esperanto-Societo Kebekia. La vojaĝo daŭris sep horojn. Ni alvenis ĉe la familon Metz-Fleury je la 16<sup>a</sup> horo. Zdravka kun ŝiaj gefiloj bonvenigis nin kaj montris nian dormĉambron, kie ni aranĝis niajn aferojn. La familia lingvo de la familio Metz-Fleury estas Esperanto kaj la du gefiloj estas denaskaj Esperantistoj.

Dum ni atendis la revenon hejmen de Normando, ni konsideris la libroservon. Ni miris pri la granda nombro de libroj kaj trovis kelkajn elĉerpitajn librojn. Ni ankaŭ estis surprizitaj de la malalta prezo de kelkaj libroj. Ni konkludis, ke tiu libroservo estas bona loko por aĉeti librojn.

Dudek unu homoj ĉeestis la kunsidon

de vendreda vespero. Tri el ili ne estis esperantistoj — la reklamo por la renkontiĝo allogis ilin. Normando pasigis la vesperon varbante ilin kaj tradukante por ili. La ceteraj ĉeestantoj pasigis la vesperon babilante kaj ludante kelkajn interesajn ludojn.

Sabatan matenon ni vizitis novan arkeologian kaj historian muzeon (Pointe-à-Callière). Por mi tio estis unu el la plej interesaj aferoj de la semajnfino. La vizito komenciĝis per filmo pri la historio de Montrealo. Mi lernis ke, kvankam Montrealo komenciĝis kiel franclingva loko (nomita Ville-Marie), ĝi estis anglalingva dum la plejparto de la 19<sup>a</sup> jarcento, kiam ĝi fariĝis la financcentro de Kanado. Dum la lasta parto de la 19<sup>a</sup> jarcento ĝi reigis

**...sekvo...**

## ...Vintra...

franglingva.

La ĉefa elmontrejo de la muzeo estas subtera, inter du konstruaĵoj. La elmontraĵoj (ĉe la loko, kie fondiĝis Montrealo) sekvas la historion de tiuj, kiuj konstruis kaj evoluigis Montrealon, per reala arkeologifoslokoj lasitaj malfermaj, kaj per la trovaĵoj el la fosoj. Estas kelkaj niveloj de foslokoj, komenciĝante per tiu de la indianoj supren ĝis la nuntempo.

Post la vizito al la muzeo, ni tagmanĝis ĉe mirinde malmultekosta ĉina bufedejo. La manĝo konsistis el pli ol 50 malsamaj pladoj kaj kostis nur 6,50 kanadajn dolarojn.

Ni poste subeniris al la haveno por aŭskulti « ŝipkoncerton ». Tiu estis zorge planitaj kaj precize altempigitaj sonadoj de la korno de dekoj da ŝipoj en

la haveno. Vere impresiga.

Ni piedrondiris la malnovan parton de Montrealo, gvidataj de Normand Fleury. Malgraŭ la malalta temperaturo (-10° C), la blovanta vento kaj la falanta neĝo, la ekskurso estis interesa kaj ĝuebla.

Sabatan vesperon ni partoprenis en komuna, babiladplena vespermanĝo bonguste preparita de la montreala esperantistaro. Ni poste ludis diversajn vortludojn.

Dimanĉan matenon, ni diskutis la programon de ARE 1996. Ni poste revenis hejmen.

Ne necesas diri, ke ni ege ĝuis nian semajnfinojn en Montrealo. Ni ankaŭ grande profitis el ĝi: ni reentuziasmiĝis pri Esperanto kaj ĝia antaŭeniĝo pro la entuziasmo de la ESKanoj. Ni tre dankas niajn gastigantojn. [ *El Verda Lumo*, aprilo 1995 ]

## Écrire en ronds ?

Dans le dernier numéro de *La Riverego*, avait été proposée l'idée des cercles de correspondance, avec pour but de relier de manière plus active les espérantistes du Québec. On a reçu... deux réactions. La première de Bruce Arthur, de Saskatchewan, responsable de la *Jeunesse espérantiste du Canada*, et qui avait eu la même idée. La seconde, de Patrice Mongeau, de Montréal, qui proposait plutôt de réunir les correspondants par thèmes et qui se demandait si l'idée ne conviendrait pas aussi pour une correspondance à l'échelle du monde.

Il reste donc encore de la place pour vous...

## Cours

Cet hiver ont eu lieu deux cours d'espéranto pour débutants, à Montréal, avec une dizaine de participants. L'un des deux a eu lieu à l'Université McGill (dans le cadre d'une association étudiante) et n'était qu'une brève initiation. Si vous désirez vous-même vous inscrire à un cours pour l'automne, faites-le-nous savoir dès maintenant.

Peut-être avons-nous actuellement la masse critique suffisante pour un cours plus avancé. Si ça vous intéresse, contactez-nous.

## Esperenglish

De l'*espéranto*, tel qu'un débutant anglophone pourrait le transformer... pour faire changement. Cherchez les erreurs.

Estis bela mateno en la falo, kaj mi ĵus finis bonan matenmanĝon en

Peut-être seriez-vous plutôt intéressé à assister à des groupes de discussion moins formels, afin de pratiquer ce que vous avez appris. Ou à en animer un. Il s'agirait de réunions plus « sérieuses » qu'une rencontre de club, plus axées sur la maîtrise progressive de la langue, et adaptées aux besoins de chacun des participants. Contactez la S.Q.E.

restaŭranto. Mi satis min sur benko sub okarbo en la parko. Kelkaj infanoj ronde de mi ludis tagon sur la graso. Mi skribis poŝt-kardon al amiko sed mi ne sendis ĝin, ĉar mi mankis monon por la postaĵo. Trans la strato estis granda preĝejo kie okazis geedziĝo. Mi estimatatas, ke estis pli ol cent popoloj tie, kaj la brido rigardis tre bela en blanka edziniĝ-dreso kaj kun granda buketo de floroj en la armoj. [ *El Inter ni*, n<sup>o</sup> 109, majo 1995 ]

*La Riverego (Le fleuve)* est publié par la Société québécoise d'espéranto en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 150 exemplaires sur papier recyclé. Gratuit pour les membres de la S.Q.E. Autrement, l'abonnement annuel est de 10 \$.

*La Riverego* estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia en marto, junio, septembro kaj decembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotkopiita 150oble sur reuzpapiro. Senpage por la membroj de E.S.K. Por aliaj, la jara abono kostas 10 CAD. UEA-kodo de la Societo : kebk-d.

**Échéance pour le prochain numéro / limdato por la venonta numero : 1995.09.01.**

Rédacteur / redaktis : Sylvain Auclair. Ont collaboré à ce numéro / kunlaboris al ĉi tiu numero : Suzanne Bolduc, Jérôme Frédéric Bouchard, Normand Fleury, Martin Lavallée, Bill Mak kaj Marco P. Maertens. Administrateurs de la S.Q.E. / estraranoj de E.S.K. : Normand Fleury (président / prezidanto), Sylvain Auclair (vice-président / vicprezidanto), Marco P. Maertens (secrétaire-trésorier / sekretario-kasisto), Jean-Claude Bélanger, Márta Dikman.

**Esperanto-Societo Kebekia / Société québécoise d'espéranto**

6358-A, rue de Bordeaux

Montréal Québec H2G 2R8

Répondeur / telefonrespondilo : (514) 272-0151

# Renkontiĝo kun Claude Piron

Bill Mak

Un colloque de socio-linguistique, à Ottawa, a permis de faire connaître l'espéranto. Y participait entre autres Claude Piron, de Suisse, dont la présence a donné lieu à une réunion d'espérantistes d'Ottawa, de Montréal et de Toronto.

**D**e la 25<sup>a</sup> ĝis la 27<sup>a</sup> de majo okazis soci-lingvistika konferenco ĉe la Otava Universitato. Ĝi temis pri la lingvaj politikoj en la Unuiĝintaj Nacioj kaj pri lingvaj rajtoj de malplimultoj. Partoprenis tri bone konataj esperantistoj, nome S<sup>ro</sup> Humphrey Tonkin, profesoro ĉe la Universitato de Hartford, Usono, eksa prezidanto de U.E.A. kaj fekunda aŭtoro ; S<sup>ro</sup> Claude Piron, profesoro pri psikologio kaj lingvistiko ĉe la universitato de Ĝenevo, kaj ankaŭ esperantista aŭtoro ; kaj S<sup>ro</sup> Mark Fettes, nun ĝenerala sekretario de U.E.A. Ili povis doni al la ĉeestantoj siajn opiniojn pri la monda lingvoproblemo.

Pro la malofteco de tiaj konferencoj, venis esperantistoj de apudaj urboj (ĉefe Montrealo, sed ankaŭ Ontariaj urboj) por aŭdi la prelegojn de la famaj esperantistoj.

La ĉef-alparolado de S<sup>ro</sup> Tonkin, *Lingva hierarkio ĉe UNo*, malfermis la konferencon. S<sup>ro</sup> Tonkin priskribis la historian malantaŭon de la nuntempa lingva politiko de UNo. Tiujn politikojn, li montris, emas influi multaj politikaj faktoroj. Cetere, nuntempe, la grandega kosto de tradukado estas problemo solvenda en ia ajn internacia organizo. S<sup>ro</sup> Tonkin proponis kvar eblecojn : 1) konservi la nuntempan politikon — distingo inter laboraj kaj oficialaj lingvoj ; 2) uzo de internacia neŭtrala lingvo, kiel Esperanto ; 3) pli efika sistemo de komunikado/trakukado aŭ lingvo-lernado ; 4) privatigo de la tradukada servo.

En la sekvanta posttagmezo, Mark Fettes plue diskutis pri la lingva situacio de UNo. Li detale analizis la problemojn de la UNa lingvopolitiko. La koncepto pri oficiala lingvo en UNo estas problema, li komentis, kiam

lingvoj kiel la germana, la japana, la indonezia kaj eĉ la svahila akiras gravecon en diversaj mondopartoj. Por bildigi la malefikecon de tradukado en UNo, S<sup>ro</sup> Fettes rakontis kelkajn amuzajn anekdotojn.

Krom tiuj prelegoj de esperantistoj, ankaŭ estis informaj prelegoj pri tre diversaj temoj : la signifoj de toleremo (aŭ maltoleremo (!), laŭ dana profesorino) en kunteksto de malplimultaj rajtoj ; la lingva situacio en diversaj landoj, ekz. Eŭropa Unio, Ĉ i n i o , Kanado, Sud-Afriko.

Bedaŭrinde, la du interesaj prelegoj de S<sup>roj</sup> Tonkin kaj Fettes okazis

dum labortagoj kaj nur kelkaj esperantistoj povis partopreni. Tamen, sabate, pli ol 30 esperantistoj venis pro la prelego de S<sup>ro</sup> Piron.

La temo de tiu prelego estis *Solvo studinda : Esperanto* (Une solution à étudier : l'espéranto). Anstataŭ nur priskribi la lokon de Esperanto en la internacia komunumo, S<sup>ro</sup> Piron efike kaj konvinke vidigis la simplecon kaj la utilon de Esperanto kiel ebla komuna labor-lingvo en UNo. Li kredas, ke la uzo de neŭtrala lingvo estus la plej simpla maniero solvi la problemon de lingva malegaleco. « Lingvo, en internacia debato, estas kiel armilo, li komentis, kaj la lingva kapablo de, ekzemple, Korea politikisto, eĉ lerninte la anglan pli ol 3000 horojn, neniam egalas tiun de homo, kiu denaske parolas la oficialan lingvon (kiel la angla) ».

Li plue rimarkigis, ke « ni scias, ke neniam oni permesas al malpeza boksisto konkuri kontraŭ peza

boksisto, Se ni ekhavas tian prudenton, ni ekscias la utilecon de Esperanto. » S<sup>ro</sup> Piron estis oficiala tradukisto en kvar lingvoj de UNo, kaj do bone komprenas ĝian lingvan problemon. « Esperanto, li asertas, estas trezoro kaŝita. »

Kvankam tempo mankis, la kunvenestro petis S<sup>ron</sup> Piron priskribi la lingvon. Jen la plej interesa parto de la prelego : S<sup>ro</sup> Piron ekklarigis la strukturon de Esperanto en Esperanto (li poste konfesis, ke post iom da

tempo, li forgesis, ke li parolas Esperante). Al la ĉeestantaro, li donis etan lecionon kaj li eĉ montris ke, s t r u k t u r e ,

Esperanto pli similas la ĉinan ol la latinajn lingvojn. Por multaj ĉeestantaj universitatuloj, tio estas la unua serioza prezento de Esperanto. Post granda aplaŭdo, la ĉeestantoj plu diskutis pri Esperanto.

La lokaj otavaj esperantistoj kompreneble uzis la bonan okazon kaj invitis S<sup>ron</sup> Piron kaj siajn familianojn al posttagmeza renkontiĝo. Ĉe loka esperantisto — Yves Bellefeuille — pli ol 30 esperantistoj ĝuis agrablan renkontiĝon, en bona etoso kaj bela vetero. Krom la du nomitaj prelegintoj, ĉeestis Paŭlo Hopkins, prezidanto de la Kanada Esperanto-Asocio, Merle Haltrecht-Matte, ĉefdelegito de U.E.A. en Kanado, kaj la prezidanto de E.S.K., Normand Fleury. Estis ja feliĉa okazo por la esperantistoj de tiu-ĉi granda lando interŝanĝi amuzajn anekdotojn kaj rakontojn kaj pridiskuti la nunan E-movadon — aŭ eĉ simple renkontiĝi kaj amikiĝi.

# Finno-quoi ?

Jacqueline Lépeix

L'auteur est membre d'un groupe strasbourgeois d'Amnistie Internationale. C'est dans une revue de cet organisme qu'elle fait part de son usage de l'espéranto.

Notre groupe a participé à une action « Peine de mort / Pays baltes ». On nous a attribué l'Estonie. Donc, on se répartit les tâches. Il faut notamment écrire aux différents partis politiques. On distribue les adresses.

Certains d'entre nous reçoivent des réponses. Le ministère des Affaires étrangères de l'Estonie nous indique que l'Estonie compte abolir la peine de mort à l'occasion de son adhésion au Conseil de l'Europe. Ça tombe bien, on est sur place ! Donc, quand on voit flotter, sous le vent de Strasbourg, le drapeau estonien, on réécrit (courtoisement) : *tiens, au fait, vous nous aviez promis...*

Pour ce qui est des partis politiques, un seul nous répond. C'est le parti Pro Patria. Mais il y a un hic : comme son nom l'indique, le parti Pro Patria est un parti patriote. Donc, ils nous écrivent en estonien. Bon, on est pour le respect des droits culturels des minorités. Mais l'estonien, ça ne court pas les rues à Strasbourg.

*Dis donc, Jacqueline, puisque tu as appris le polonais, tu ne comprendrais pas aussi l'estonien, des fois ?*

— *Ah, mais ça n'a rien à voir : l'estonien n'est pas une langue slave, comme le polonais, ni même balte, comme le lituanien, c'est une langue finno-ougrienne.*

— *Finno-quoi ?*

— *Ben oui, ça ressemble au finnois et au hongrois. Peut-être aussi au basque, mais là, je ne suis pas sûre.*

— *Et alors ?*

— *Alors, les aminches, j'entrave que pouic, pour parler mon dialecte à moi.*

Ce n'est pas grave, on envoie une photocopie à l'équipe « peine de mort », à Paris, ils trouveront sûrement

# Aŭtuna Renkontiĝo Esperantista

Normand Fleury

Inscrivez déjà à votre agenda la rencontre internationale qui aura lieu au Vermont, lors de la fin de semaine de notre Action de Grâce. Cette année, le programme accordera une plus grande attention à ceux et celles dont l'espéranto n'est pas encore au point.

La venonta kaj dua Aŭtuna Renkontiĝo Esperantista (ARE) okazos de la 7<sup>a</sup> ĝis la 9<sup>a</sup> de oktobro, en la Okemo Mountain Resort, en Ludlow (Vermonto). Eblas loĝi en la renkontiĝejo, kies adreso estas : RFD 1, Ludlow VT 05149. Telefonnumero : 1-800-78-OKEMO. Eblas ankaŭ loĝi ĉe la apuda junulara gastejo, kiu ofertas 18 litojn, kaj troviĝas dek kvin minutojn for : Trojan Horse AYH-Hostel, Vermont Highway 100 South, Ludlow VT 05149. Telefonnumero : (802) 228-5244.

Prezroj por loĝi en Okemo multe varias ; petu la informilon. Estas pli bone grupe mendi apartamenton kun pluraj dormĉambroj, kaj dividi la kostojn. Se vi estas sola (aŭ paro), vi povas anonci vin ĉe mi ĝis la komenco de septembro, kaj mi klopodos aranĝi kunloĝadon. Eblas kuiri ĉar la apartamentoj estas plene ekipitaj.

Programo : estos diversnivelaĵoj kursoj, diskutrondoj kaj pli fakaj

prelegoj. Vespere estas ludoj, popoldancado, muzikkoncerteto, kantado kaj lumbildoj pri Sanktularnokto (Halloween). Okazos komunaj manĝoj, vizito al vilaĝo Ludlow, promenado tra la arbaro, k.t.p. Vi certe ne enuos...

Kotizo : por aliĝi, kostas 30 USD ; por senlaboruloj, emeritoj, studentoj : 20 USD. Infanoj ĝis 14 jaroj partoprenas senpage.

Pasintan jaron, venis geesperantistoj el Otavo, Montrealo, Halifakso, Novjorko, Bostono, Hartfordo, Albany (New York) kaj multaj aliaj lokoj. La etoso estis tre bona, kun multaj eblecoj babili, amikiĝi...

ARE estas la plej granda esperanto-evento en Nordorienta Nord-Ameriko. Invitu ankaŭ viajn amikojn aŭ familianojn. Por pli da informo pri la loĝado, kontaktu min, telefone aŭ telekopie, je (514) 495-8442, aŭ poŝte ĉe la adreso de E.S.K. Bonan someron kaj ĝis revido en aŭtuno.

un traducteur d'estonien.

Eh ben non, à la Pierre-Levée, ils ne trouvent pas ! Tous les groupes français ayant travaillé sur l'Estonie ont reçu la même lettre de *Pro Patria*, mais personne n'a compris.

Arrivent les vacances d'été. Je pars pour l'Espagne, participer à un congrès d'espéranto. À tout hasard, je prends avec moi la lettre de *Pro Patria*. Après le congrès, je participe, toujours en espéranto (et en autocar), à un circuit touristique en Andalousie. On est une quarantaine et, dans le groupe, il y a... un Estonien ! Un salaire estonien

normal ne permet pas de passer ses vacances en Andalousie, mais cet Estonien-là a de la chance : son correspondant allemand lui paye ce circuit.

C'est donc dans l'hôtel San Pablo, entre une visite à l'Alhambra et une soirée de flamenco, que j'apprends enfin que le parti *Pro Patria* nous assure de sa solidarité dans le combat que nous menons pour l'abolition de la peine de mort en Estonie. Après tout, l'Estonie, ça n'est pas si loin que ça de chez *Zamenhof* ! [ *La chronique d'Amnesty*, fév. 1995 ]

# Raporto de la prezidanto

Normand Fleury

À défaut de nouvelles spectaculaires, le président décrit le plaisir de voir de nouvelles personnes s'enthousiasmer pour l'espéranto. Il présente ensuite rapidement l'apport de chacun, en remerciant ses collaborateurs.

**H**o ve, plia jaro pasis. Mi devas verki mian raporton kaj ne havas mondiskuan novaĵon por prezenti al vi...

Mi do skribu al vi pri simpla novaĵo. Ĉi-jare, kiel kutime, ni perdis multajn membrojn kaj bonŝance ankaŭ gajnis plurajn novajn. Ĉiam ĝojigas min kiam novulo alvenas kun entuziasmo kaj demandas min: « Kial UNO ne uzas Esperanton? » aŭ « Ĉu Esperanto estas vere uzebla en multaj landoj? ».

Mi ŝatas respondi al homoj, kiuj malkovras Esperanton kaj havas grandan intereson pri ĝi. Ili tuj vidas eblecon pri « pli bona mondo », « solvo de multaj mondaj problemoj », « ŝparego de mono kaj tempo por tradukado » k.t.p.

Mi ŝatas vidi la entuziasmon en la okuloj de novuloj. Mi ŝatas vidi ilian ĝojon. Kvazaŭ ili malkovrus novan

« mondon » pere de Esperanto.

Eble mi ŝatas tion ĉar kiam mi malkovris Esperanton, mi estis en Eŭropo. Mi tiam povis tuj ekuzi mian scieton kaj rapide povis progresi. Por mi, Esperanto ne estis io teoria kurso sed io konkreta, tuj uzebla. Mi multe vojaĝis kaj uzis ĝin dum pli ol du jaroj. Mi travivis belegajn momentojn.

Jen, mi estas for de mia jara raporto kiel prezidanto de ESK.

Mi diru, ke la estraro regule kunvenis. Silvano bone estris la financojn kaj sekretariumis kaj respondecis pri la Libroservo kaj redaktis ĉi tiun bultenon. Mi sincere dankas lin ĉar li plej multe faris el la kvin estraranoj.

Mi ĉefe okupiĝis pri la diversaj renkontiĝoj, montrealaj, provincaj kaj aŭtuna en Vermonto. Laŭ mi, estis pli da partoprenantoj ol en la pasintaj jaroj kaj la etoso estis plurfoje tre bona. Mi

aparte menciuj la ĵusan Belgan versperon de la Montreala Klubo, kie al la etoso helpis la biero... Bedaŭru tiuj, kiuj maltrafis ĝin.

Finante, mi volas danki ĉiujn, kiuj helpis nin progresigi la movadon. Via helpo estas grava kaj cetere ĉiam bonvena.

## Nova estraro

En Sainte-Catherine-de-Hatley elektiĝis nova estraro, kies membroj poste dividis la postenojn inter si. Jen ĝia konsisto: Normand Fleury (prezidanto), Sylvain Auclair (viceprezidanto), Marco P. Maertens (sekretario-kasisto), Jean-Claude Bélanger kaj Márta Dikman (konsilantoj).

# Mono ne kreskas en la arboj

Sylvain Auclair

De nouveau, la S.Q.E. a perdu de l'argent — plus de 200 \$. Mais, comme le membership recommence à croître (nous en sommes à 110) et que nous avons pu éliminer certaines dépenses (rencontres déficitaires, frais bancaires),

**S**e ne estus tiel, aŭtunoj estus tre riĉigaj. Nu, jen resuma raporto pri la financoj de nia Societo.

Dum la jaro 94.06.01-95.05.31, ni perdis 200,22 \$ (kompare kun perdo de 252,97 \$ dum la antaŭa jaro). Nia kapitalo malkreskis al 2446,94 \$. Ni do ne frontas baldaŭan bankroton. Krome, mi opinias, ke grandan parton de tiu perdo kaŭzis fojaj eventoj.

Ekzemple, la ĉi-jaraj renkontiĝoj portis perdon de preskaŭ 40 \$, kompare al gajno je pli ol 250 \$ dum 93-94. (Cetere, la ĵusa somera rekontiĝo portis grandan profiton.) Malaltiĝis la donacoj (58 \$ anst. 164 \$), iomete

kreskis la kostoj de *La Riverego*, kreskis la kosto de nia telefonlinio (de 187 \$ al 246 \$). Tamen iomete plialtiĝis la enpagitaj kotizoj (de 845 \$ al 898,25 \$), kaj, se la bankaj kostoj restis altaj, ĉ. 120 \$, ni ĵus sukcesis ĉesigi ilin. Ni malpli elspezis por reklamado, sed la antaŭa jaro estis tiurilate escepta.

Krome, ni plu atendas la jaran subvencion de la Kanada Esperanto-Asocio.

Bona novaĵo: ĉesis la falo de l' membraro, kaj ni nombris, fine de l' Societa jaro, cent dek.

Pri la aktivoj, preskaŭ nenio ŝanĝiĝis.

El 4285,25 \$, plej granda parto, t.e. 4055,93 \$, estas tuj havebla mono. Kvamkam la sumo de l' pasivoj malmulte ŝanĝiĝis, notindas kelkaj evoluoj: malkreskis la montreala fondaĵo (restaĵo de l' mono de l' Montreala Klubo), solviĝis la financoj de la Junulara Kongreso (ni tamen plu tenas por KEJO 254 \$), sed plialtiĝis la antaŭpagitaj kotizoj — 575,50 \$ anst. 379 \$ — kio plicertigas kotizojn por la venontaj jaroj. Ankaŭ kreskis la rezervo por la dumvivaj membroj — de 338 \$ al 562 \$ — pro aliĝo de tria dumviva membro.

# Nova sekcio por KEJO

Marco Maertens

Pour mieux faire circuler l'information, l'OJEQ a décidé d'utiliser une section de *La Riverego* plutôt que de continuer à publier son propre bulletin.

Ekde la restarigo de KEJO lastjare, la estraro provas plej efike disvolvigi la manieron, per kiu la organizo servas la junularan movadon en Kebekio. Jen paŝo antaŭen. La estraro decidis plibonigi la disdonon de informoj, nome la bultenon, kunigante ĝin kun la ESKa informilo. Ekde ĉi numero, KEJO informos ne per aparta folio, sed pere

de junulara sekcio de *La Riverego*.

Pluraj kialoj motivis ĉi tiun decidon. Unue, ni konstatis, ke preskaŭ ĉiu membro de KEJO ankaŭ membras en ESK. Ni decidis, do, ke la mono bezonata por la produktado de aparta bulteno pli indas al aliaj celoj. Plie, la ĝenerala movado en Kebekio restis malpli bone informita pri la stato de la junulara, pro la ne-ricevo de *La Juna*

*Lilio*. Ĉi tiel, kaj la ESK-anoj, kaj la KEJO-anoj estas same kaj bone informitaj. Cetere restis zorgoj pri la tempokostoj provokitaj de aparta kompostado de kroma bulteno — des pli pro la manko de taŭga komposta softvaro ĉe la estraro.

KEJO bonvenigas kontribuojn specife por la junulara sekcio. Ilin sendu rekte al la redaktoro de *La Riverego*.

## La Estonteco de Kebekio, ĉu Esperanta ?

Marco Maertens

Présentation et extraits du mémoire soumis par l'OJEQ à la Commission Jeunesse sur l'Avenir du Québec

Ĉi jaro certe estas interesa por Kebekianoj. Ne nur pro la restarigo de KEJO, sed ankaŭ pro la debato pri eventuala sendependiĝo de Kebekio. Ekigante la debaton, la kebekia registaro starigis komisionaron por enketi inter la civitanoj pri iliaj pensoj pri la estonteco politika. Ĝi starigis 15 regionajn komisionojn, aĝularan kaj junularan.

Ne preterpasis la estraron de KEJO la ebleco profiti ĉi tiun lastan komisionon. Grandparte danke, sed certe ne ekskluzive, al la laboro de la eks-

prezidanto, Patrice Germain, verkiĝis 15-paĝa memuaro. La memuaro konsistas el plur-ĉapitra teksto, priskribanta Esperanton, ĝian historion, ĝiajn

eventualajn helpojn al la socio, kaj la proponon de KEJO.

Por plej efike propagandi la lingvon, la teksto aperis dulingve: en la maldekstra kolumno france, dekstre en Esperanto. Aneksse troviĝis listo de Nobel-premiitoj, kiuj iel ajn subtenis la lingvon internacian, kaj la titoloj de kelkaj verkaĵoj koncernaj.

Pri la kebekia sendependiĝo mem, la memuaro konsilas nek favore, nek kontraŭe. Ĝi nur pridiskutas la plurajn pozitivajn aspektojn de Esperanto al ajna socio, ĉu kebekia, kanada, japana aŭ usona.

Krom al la Junulara Komisiono, ni dissendis la memuaron ankaŭ al ĉiuj politikaj partioj, kaj kebekiaj kaj federaj, kiuj ne partoprenis la Komisionaron. Ĝin ricevis ankaŭ tagĵurnaloj. KEJO havigis la tekston ankaŭ al la Kanada Esperanto-Asocio.

Kvankam ni ricevis nur unu reagon,

Al la ĉirkaŭe priskribita memuaro de KEJO reagis ĝis nun nur Jean Charest, estro de l' Progresem-Konservativa Partio. Li asertas ke: « La lecture de votre mémoire a été très intéressante et m'a permis de me familiariser davantage avec la langue si noble que vous parlez. »

KEJO feliĉas, ke eblis prezenti nian lingvon al la politika medio. Jen kelkaj eltiraĵoj de la memuaro:

### Des valeurs de la société québécoise

L'OJEQ tient à rappeler l'attachement qu'a la société québécoise aux valeurs démocratiques et aux droits de la personne et c'est dans ce but qu'elle se

présente aujourd'hui à cette commission. Les espérantistes, comme bien des Québécois et des Québécoises, sont généralement des partisans, partisanes des droits de la personne, parmi lesquels les Espérantistes soulignent particulièrement les droits linguistiques.

L'espéranto se veut une langue neutre pour tous. Les Nations-Unies, d'ordinaire neutres et en faveur des droits de chacun, ne respectent pas l'égalité des droits des quelques milliers de langues et dialectes existant

à travers le monde. En n'utilisant que six langues de travail, dont le français, l'ONU discrimine tous les peuples qui parlent d'autres langues. Bien que cela soit

une solution plus pratique que de reconnaître chacune des 5 000 langues du monde, il vaudrait la peine de considérer une alternative, qui permettrait en même temps d'économiser sur la production de milliers de documents en six langues et qui garantirait l'égalité de tous les peuples. Cette alternative, c'est l'utilisation

d'une langue de travail neutre, comme l'espéranto.

Tout pays de la communauté internationale, y compris le Canada et un éventuel Québec souverain, peut jouer un rôle important à ce sujet. La possibilité que le Québec devienne un pays souverain pourrait cependant permettre plus, car la constitution d'un Québec souverain n'est pas encore écrite et peut de ce fait inclure plus facilement un paragraphe en faveur d'une langue internationale neutre.

### Notre proposition

Nous demandons donc, au nom de l'OJÉQ, que les commissaires tiennent compte des avantages d'une langue auxiliaire neutre, comme l'espéranto, et qu'ils et elles fassent tous les efforts pour inclure dans l'éventuelle constitution du Québec, la résolution suivante :

Que le Québec a, comme société, un grand respect pour les droits humains et est en faveur de l'acceptation d'une langue seconde neutre pour tous.

### Conclusion

Ainsi, le Québec favorisera l'espéranto, ou n'importe quelle langue qui se montre plus adéquate, comme langue seconde neutre. L'Histoire nous montre que l'importance des langues nationales dépend plutôt de la puissance et de l'influence des quelques États, et peut, donc, changer très facilement. Il faut qu'on choisisse une langue internationale en raison de ses qualités qui répondent aux exigences de l'usage international, et non pas à cause de la puissance politique, économique ou militaire dont jouit temporairement l'État où cette langue est parlée.

Il serait logique de choisir l'espéranto et de faire ce choix de manière définitive ; on éviterait ainsi à la prochaine génération de chercheurs et de savants la tâche de traduire et d'apprendre l'espagnol, l'arabe, ou le chinois...

## Kolegioj : ĉu propagandi studente ?

Martin Lavallée

L'OJÉQ a tenu un kisoque au cégep André-Laurendeau. Une expérience à répéter.

Malmultaj homoj estas pli interesotaj ol studentoj, kiam temas pri internaciaj amikecoj. Unu el la aktivecoj de esperanta informado organizitaj de KEJO estis vizito de kolegio André-Laurendeau, en LaSalle, apud Montrealo. Rezervi lokon estis formalajo kaj tri homoj unuece kunlaboris je tiu projekto : Marco, Patrice kaj mi. Duonpaĝa artikolo aperis en la oktobra numero de la studenta ĵurnalo *Vox Populi* : ĝi titoliĝis *esperanto* kaj finiĝis per la ESK-a telefon-numero.

Dum tuta semajno, Patrice Germain dediĉis sin plenkore por priskribi la morfologion kaj evoluon de esperanto.

Martin nur petis, kiel studento ĉe tiu kolegio, budlokon. Kelkaj studentoj eklernis la internacian lingvon, inter ili unu el la estraranoj de la Ĝenerala Asocio de la Studentoj.

Konsiderinda renkontiĝo pro tiuj interesaj esperantaĵoj : instruisto, kiu aŭdis antaŭ kelkaj jaroj prelegon de Sylvain Auclair pri Esperanto alparolis al Patrice. Temas pri S<sup>ro</sup> Bruno Roy, instruisto pri la franca kaj prezidanto de la Kebekia Asocio de Verkistoj.

KEJO konsideras la eblecon konkeri aliajn kolegiojn. Individua iniciato kaŭzis tiun eventon, kaj aliaj similaj certe helpos nin pligrandigi nian membraron.

## Joyeuses nocés !

Peut-être est-il encourageant de voir dans notre société le nombre de mariages diminuer, parce que les mots espéranto concernant le mariage sont assez difficiles à maîtriser. Essayons-nous-y quand même !

Le radical de base est **edz-**, qui signifie *époux*. C'est d'ailleurs le mot espéranto dont l'origine est la moins sûre. De là, on forme facilement les mots **edzino**, **edzo** et **geedzoj**, qui veulent dire *épouse / femme, époux / mari et époux / mari(s) et femme(s)*.

Jusqu'ici, pas de problème. C'est alors qu'entre en jeu le système de dérivation. *Se marier* se traduit donc, pour une **femme**, par **edziniĝi**, pour un **homme**, par **edziĝi**, et pour un **couple**, par **geedziĝi** — c'est-à-dire *devenir épouse, époux*.

À l'opposé, *épouser quelqu'un*, c'est le rendre époux/se, ou devenir son époux/se. Si je veux traduire *J'épouse*

*Marta*, je peux dire **Mi edzinigas Martan**, ou **Mi edziĝas al Marta**. Le second est plus clair, car **edz(in)igi iun**, c'est aussi la tâche des agents du ministère de la Justice. Seuls ceux-ci peuvent **geedzigi** un couple.

Évidemment, c'est la même chose pour le *divorce*, **eksgeedzigo**. On peut ainsi retrouver les mots : **eksedzo**, **eksedzino**, **eksedziĝi**, **eksedziniĝi**, **eksedzigi**, **eksedzigo**, **eksedzinigi**, **eksedzinigo**, **eksgeedziĝi**, **eksgeedzoj**, **eksgeedzigi**, **eksgeedzigo**. Tâchez de les analyser vous-même !

Quant au mot *noces*, on le traduit par **nupto** (au singulier). Bon voyage !

La Universala Esperanto-Asocio havas nun novan ĉefdelegiton por Kanado. Temas pri S<sup>ino</sup> Olga Du Temple. Ŝia adreso estas : 765 Braemar Avenue, Sidney BC V8L 3S1.

# Kalendaro de venontaj okazaĵoj

- 10<sup>a</sup> ĝis 15<sup>a</sup> de **julio** : Hartford (Connecticut, Usono). **Esperanto-kursoj**.
- 15<sup>a</sup> ĝis 17<sup>a</sup> de **julio** : NovJorko (Usono). **Kongreso de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko**.
- 15<sup>a</sup> ĝis 22<sup>a</sup> de **julio** : Maribor (Slovenio). **Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda**.
- 22<sup>a</sup> ĝis 29<sup>a</sup> de **julio** : Tampere (Finlando). **Universala Kongreso de Esperanto**.
- 31<sup>a</sup> de julio ĝis 8<sup>a</sup> de **aŭgusto** : Sankt-Peterburgo (Rusio). **Internacia Junulara Kongreso de Esperanto**.
- 8<sup>a</sup> de **septembro** : Montreala Esperanto-Domo, 19 h 30. Temo : **Zairio**. Ni invitas vin prepari ion.
- 9<sup>a</sup> ĝis 11<sup>a</sup> de **oktobro** : Ludlow (Vermonto). **Aŭtuna**

## Mortis la papago

Le *Papago* ne fonctionne plus. On fait ici l'historique de ce moyen novateur de parler et d'entendre l'espéranto.

Iam famis la montreala esperantistaro pro sia noveca ĉiutaga telefona gazeto, la *Papago*. Bedaŭrinde tiu ĉi ĉesigis sian agadon dum la lastaj monatoj. Mortis la *Papago*.

Ideo de Patrice (Patriko) Mongeau, la *Papago* komencis sian vivon kiel ordinara telefon-respondilo, zorge elektata, konektita al dua numero de l' hejma telefono de Patriko. Tiu ĉi ĉiu-vespere, post la horlimo, kopiis la kontribuojn de l' vokintoj, aldonante siajn komentojn (kaj kelkfoje kreante la tutan programon) en la el-kasedon de l' respondilo. La kutimaj vokantoj devis telefoni ĉiutage (krom dimanĉe) por ne maltrafi tagajn programojn. Rapide kreiĝis grupeto da konstantaj kontribuantoj. Eĉ audiĝis intervjuoj, kvazaŭ ĉe radio.

Le celo de Patriko estis ebligi al la montreala esperantistaro pli ofte paroli kaj aŭskulti esperante. La monataj klubaj renkontiĝoj ja ne estas sufiĉe oftaj por ebligi al komencantoj bone progresi.

Konsiderante la bonajn rezultojn, Patriko aĉetis mem komputilon kun taŭga aldonaĵo, kaj kreis softvaron por komputiligi kaj plibonigi la *Papagon*. Tiam eblis aŭskulti la programojn de pluraj pasintaj tagoj, krei kaj aŭskulti konstantajn kontribuojn, kreiĝis franca *Papago*, kaj la komputilo kapablis mem voki liston da homoj, por sciigi, ekzemple, pri neantaŭvidita okazaĵo aŭ rememorigi pri la klubaj aktivaĵoj.

Ĉu tiuj pli bonaj eblecoj mortigis la entuziasmon? Ni ne scias. Nu, okazis jene, ke malpli kaj malpli multaj homoj okupis pli kaj pli multan tempon en la programoj — foje iom tede. La franca *Papago* iom post iom iĝis pli grava ol la esperanta, eĉ por esperantistoj. Kaj la komputilo, fine, utilis ĉefe kiel malsimpla respondilo por E.S.K. kaj por vokigi

**Renkontiĝo Esperantista.** Internacia etoso, belega kongresejo, multaj okazaĵoj.

- 3<sup>a</sup> de **novembro** : Montreala Esperanto-Domo, 19 h 30. Temo : **Kroatio**. Ni invitas vin prepari ion.
- 16<sup>a</sup> de **decembro** : Montreala Esperanto-Domo, 18 h. Komuna manĝo okaze de la **Zamenhofa kaj jarfina festo**. Kultura programo : **preparu ion!**
- 7<sup>a</sup> ĝis 9<sup>a</sup> de **junio 1996** : Sainte-Catherine-de-Hatley. **Printempa renkontiĝo de E.S.K.**
- 20<sup>a</sup> ĝis 27<sup>a</sup> de **julio** : Prago (Ĉeĥa Respubliko). **Universala Kongreso de Esperanto**.

Ni plezure respondos demandojn pri la supraj (kaj aliaj) okazaĵoj.

## Novaj titoloj

Aldoniĝis al la ĵus sendita katalogo de la Libroservo la jenaj titoloj :

- **Plena Analiza Gramatiko de Esperanto.** K. Kalocsay, G. Waringhien. 1985 (5a eld.) 599 pĝ. Bindita. Jubilea kolekto nro 2. La plej detala kaj fidinda priskribo kaj preskribo pri la ĝusta uzado de Esperanto. Normverko. 55 \$
  - **Comprehensive English-Esperanto Dictionary.** P. Benson. Por la nordamerika angla lingvo. Broŝurita : 30 \$. Bindita : 40 \$
  - **Asteriks gladiatoro.** Nove tradukita bildstrio, kun la famaj Gaŭloj. Kolora. 20 \$
  - **Zamenhof, Creator of Esperanto.** M. Boulton. Anglalingva biografio de L. Zamenhof. 25 \$
  - **Kajto.** La unua registraĵo de populara grupo. 1989. Originalaj esperantaj tekstoj de diversaj aŭtoroj, en folkloreca prezento. Kun libreto. Kasedo (nova prezo) 22 \$, laserdisko : 36 \$
  - **Procesio multkolora.** Grupo Kajto. Kasedo : 30 \$, laserdisko : 36 \$
  - **Tohuvabohuo.** Grupo Kajto. 1991. Dek ok kantoj, plejparte originale verkitaĵoj. Kun libreto. Kasedo : 30 \$, laserdisko : 36 \$
- Jam elĉerpiĝis multaj titoloj ; rapidu mendi !

homojn, kiuj tial ne plu devis zorgi por memori mem.

Okazis ankaŭ kelkaj paneoj, kiuj rompis la konstantecon de kelkaj kontribuantoj. Post riparo de la lasta paneo, Patriko decidis, ke li nun bezonas sian komputilon.

Restas plena la problemo de l' malofteco de l' klubaj renkontiĝoj. Kiel agados la nova estraro de E.S.K., ni ne scias, sed certe utilis se pli multaj pretus aranĝi diversajn kunvenojn. La renkontiĝejo atendas nur tion.